# *Maduro asertas ke la libro de Bolton malka?as invad-intencon de Trump*



Karakaso, jun 18 (RHK) La prezidento de Venezuelo, Nicolás Maduro, atentigis pri la celoj de la usona prezidento Donald Trump, invadi la sudamerikan landon kaj fari el ?i novan kolonion.

Per deklaroj elsenditaj de la televida ?eno Venezuela de Televizio, Maduro esprimis ke en la libro verkita de la eksasesoranto  pri nacia sekureco John Bolton, li asertas ke Trump celis transformi Venezuelon en parton de la usona teritorio, elstarigas la televida ?eno Telesur.

La? la “memorlibro”, kies eldondato ankora? ne estas konata, Trump certigis ke invadi Venezuelon estus io “cool”.

La venezuela ?tatestro komentis ke la libro de Bolton montras la malfidon de Trump pri la dekstrula deputito kaj memproklamita “prezidento komisiita”, Juan Guaidó.

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/226094-maduro-asertas-ke-la-libro-de-bolton-malkasas-invad-intencon-de-trump

**Radio Habana Cuba**